PENSEO

N-ro 333

jul. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Travintrado

Ankoraŭ hastas l' animo,
tamen ĝi ŝatas mediti
pri la revers' de l' mistero.

Kaj la korpo malrapidas,
bezonas vagi sen hast'
tra la placoj de la urbo,

tra neŝanĝeblaj arbejoj
laŭ la distritaj okuloj
donantaj novajn kolorojn
al pasinta vivotempo.



Juiz de Fora, 13/06/2019.

Poetiko

Ĉu poezio necesas?
Versoj al kio utilas?
Kiel la muzoj ekestas
en nia mondo delira?

Silente poetoj kaptas
la melodion de l' vortoj
per surpriza luma sparko,
kiu okulojn ektuŝas.

Tiam feliĉo intensa
vizitas poetanimon,
kiu reĝisoras sentojn,
kaj jen poemo naskita!

Juiz de Fora, 18/06/2019

Vojirado

Ni, pilgrimantoj de l' tempo,
nedaŭrajn boatojn gvidas
(korpojn survojajn al morto),
daŭrigos la vojaĝadon
per flugiloj de l' eterno.

Ni estas herooj solecaj
ĉe l' odisead' de l' vivo,
en la serĉo de la stelo,
kiu dormas ene de ni.

Juiz de Fora, 25/06/2019.

Mori (Usono)



AFORISMe (42)

Neniu afero
sur la tero,
estas hazarda afero.

***

Lando kiun regas
despota persono,
estas granda prizono.

***

Nenio estas pli fiodora
ol homo malica
kaj senhonora.

***

La mondo estus
agrable silenta,
se ĉiu homo estus

sufiĉe prudenta.

***

Homo kun multe da mono
estas plenrajta persono.

***

Homo, kiu mortis
kun bona nomo
estas eterne
vivanta homo.

***

Ebria azeno
en granda urbo,
povas esti kaŭzo
de granda perturbo.

***

Tie, kie mankas libero,
voĉdono estas
trompa afero.

***

La armeo de idiotoj
kiun gvidas saĝaj patriotoj
pli potencas ol la armeo de patriotoj,
kiun gvidas idiotoj.

***

La mondon regas
homoj sen konscienco
kaj sekvas ilin blinde
homoj sen pripenso.

***

Trono estas samkiel selo
sur la sovaĝa ĉevalo
la rajdanto sciu
forrajdi de la popolo
tre danĝeras por la kolo.

***

Stulte estas ne nur ,
aŭskulti ĉies parolojn
sed ankaŭ al ĉies paroloj
fermi la orelojn.

***

Kabano plena je ĝojo
plibonas ol palaco
en kiu mankas
amo kaj paco.

***

Kverelo de demagogoj
en la sfero de politiko
estas misgvida,
amara komiko.

***

Inter homoj
ne povus esti paco
sen sufiĉo da
privata spaco.

***

Jen demando
tra la tuta historio;
ĉu Dio estas Vero
aŭ iluzio?

***

Regantoj
malantaŭ politika kurteno
pli potencas ol la ludantoj
sur la politika sceno.

***

Tie, kie ĉiuj baraktas
por mono
malofte troviĝas
malavara persono.

***



Homo malsimile
al mulo kaj azeno
sekvas la reganton
sen rimeno.

***

Humaneco kaj moralo
estas la plej lasta afero
en la politika sfero.

***

Solvi konfliktojn per bataloj
estas la kutimo de
senmoralaj animaloj.

***

Tio, kio diferencigas
homon de animalo
estas humaneca moralo.

***

Politiko de paca kunlaboro
kondukas al grandeco kaj gloro.

***

Homo kiu timas
je morto
ne povas decidi
pri sia sorto.

***

Neniam aspekton fidu,
zorge la internon vidu.

***

Por vivi sukcese
en paco
vivu saĝe kun aŭdaco.

***

Ekspluatemaj uloj
kaj sangosuĉantaj kuloj
ĝuas la vivon
sur la dorso de l laboruloj.

***

Fiŝo sen akvo
ne kapablas vivi,
homo por vivi
bezonas aktivi.

Papos Nascentes (Brazilo)



Poezia humileco

verkinte preskaŭ poezie
venis min ĉiu perpleks'
revizia paradoks'
akvo varma glacifluas

denove jen poezi'
vorto kiu dance saltas
kanzono revene batas
jen plorego jen tremig'

nun en ĉi tiu poem'
verkas mi en ekstrem'
poezion, ĉu legiĝ'?
— ĉu voj' al nia vekiĝ'!

Jes kaj ne (nek jes nek ne)

ne kulpas certe printempo
nek alia ajna kuzino
ĉu l' tempo kontrahas akcelas
ĉu freneziĝas l' klimato
ĉu uragan' inund' tertremo
ĉu misil' pli misilojn portas
ĉu mortas ateisto bigoto
ĉu diferencon ĝi faras?

la planeta liniigo
estus la nova kulpulo
pro kaos' tiom profunda?
ĉio havas la momenton,
havas sian signifon
eĉ la esprim'... mondofino.

Mi estas

fulmfulme Atmano
atomo do bonega
lastlasta do unika
unua do kompleta


ritmo do intima
etimo do rekta
etiko do rito
optiko do itiner'

multoblo do uno
lucida do paca
lica do ludema

senvorta do implicita
senmakula do diskreta
nek sekreta nek eksplicita



Wel CR (Brazilo)



BA, AŬDI STELOJN!

"Ba, aŭdi stelojn!" (vi min sinesprime)
"Vi sensaĝas!" Mia al vi rediro
estu ke tio, ofte kaj kutime,
ĉefenestrigas min, gapan, sen spiro...

Dum ni tra l' nokt' parolas, ĉu sen miro
l' amplekson de l' Lakta Voj' sublime
en rebril' mi spektu? Jam sub sopiro,
laŭtagas, mi veploras, legitime!

Vi ree: "Halucinas vi, amiko!
Kion do celas la konversacio?
Ĉu povas esti ĝi babil', prediko?"

Mi redire: Amu! Homajn orelojn
amo, nur, kapablaj igos al tio
decaŭdi kaj dece kompreni stelojn!

MANKAS

Poezio
En la kapoj
Poezio
En la tekstoj
Poezio
En la buŝoj

Poezio
En manĝaĵoj
En reklamoj

Mankas poezio
En monda muziko
En la mensoj
En la ludoj

En politiko mankas poezio
(Nia plej granda mizero...)

Kie estas vi?
Ve ĝi malestas ĉie...

Well CR tradukis el Olavo Bilac (Olavo Brás Martins dos Guimarães Bilac, Rio-de-Ĵanejro dec 16 1865 — dec 28 1918) krom ĵurnalisto ankaŭ estis rakontisto, kronikisto kaj poeto. De li estas supra soneto en esperanto vesto.)

Svetlana Konyashova (Rusio)



Fasko da hajkoj

Somero. Verda
rano en pokalo de
lili'— princino.

Juniaj noktoj.
Kukolo rekukuas
kaj mi vekiĝas.
**
Juniaj pluvoj
ŝajnas senchesaj. Tagoj
sensunaj tristas.

Juniaj pluvoj
tedas. Sed ĉielarkoj
ĉiam ravas min.

Joakimo Ringelnac

Logiko

En frida nokt' sub steloklar'
jen drivis apud Norderney
svahila nigra lipohar',
je l' tria hor' laŭ ŝip' kun gaj'.
Jen mankas ja pri kelko klar'!
Pro kio drivas laŭ konstat'
en nokt' svahila lipohar' –
je l' tria hor' ĉe l' Kategat'?

Bertolt Breĥt

Tajloro de Ulm

el la jaro 1592

"Episkop', mi flugos",
diris tajloro al Moŝt'.
"Venu, por moment'."
Kaj li grimpis kun flugiloj

dum aplaŭdo kaj jubiloj
ĝis la granda granda kirktegment'.

Lia Moŝt' nur diris:
"Mensogoj, kiel ĉiam.
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam."
La episkopo plu iris.

"La tajloro jam ne vivas",
diris la homoj ĉe l' Moŝt':
"Trois la aŭdac'.
La flugiloj frakasiĝis,
la tajloro surnaziĝis
sur la dura dura kirkoplac'."

Sonoriloj sonis.
"Mensogoj, kiel ĉiam!
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam",
la episkopo admonis.
Kaj li grimpis kun flugiloj
dum aplaŭdo kaj jubiloj
ĝis la granda granda kirktegment'.

Lia Moŝt' do diris:
"Mensogoj, kiel ĉiam.
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam."
La episkopo plu iris.

"La tajloro jam ne vivas",
diris la homoj ĉe l' Moŝt':
"Trois la aŭdac'.
La flugiloj frakasiĝis,
la tajloro surnaziĝis
sur la dura dura kirkoplac'."

Sonoriloj sonis.
"Mensogoj, kiel ĉiam!
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam",
la episkopo admonis.

***PS:** Ĉu ankaŭ vi jam aŭdis tion? "Nur mensogoj, kiel ĉiam", la homaro neniam uzos la fervojon, ĝi parolos neniam Esperanton!" La socio estos komunuma neniam, neniam sen mono ktp...*

tradukis



Hans-Georg Kaiser
(Germanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Lu You (1125 – 1210)

Aŭtunaj pensoj

Avido pelas homojn kiel mil bovoj impetaj,
Prefere, kiel sablomevo, mi ĉi-monde vagas.
Senfare mi ektrovas tagojn jare longaj;
kontraŭ
Afero, kia ajn ĝi gravas, mi ebrie agas.
En lavbatado l' luno super la strateto sinkas,
Platanoj skufaligas la aŭtunon en hejmlando.
Ĉu mi, kaduka, povus supreniri altan turon
Por arde filozofi, kiel Yuanlong* aspiranto?

**Yuanlong: alinomo de Chen Deng, kiu estis el la tempo de la Tri Regnoj (220 – 265) kaj ĉiam nutris la aspiron fari bonon al la mondo kaj kompati la popolon.*

Du Fu (712 – 770)

La suda najbaro

Sinjoro Jinli, ne riĉulo, kun ermita ĉapo;
Ĝardeno lia plenas je la taroj kaj kaŝtanoj.
La birdoj surperone bekas grajnojn
senzorgeme,
Kutimas gaje alrigardi gastojn la infanoj.
Aŭtuna akvo malprofundas je kvar aŭ kvin
futoj,
Permesas nur al du-tri homoj noktveturi barke.
Sin lokas la vilaĝo ĉe sabl-duno kaj bambuoj;
Je mia ĝiso ĉe la pordo l' luno lumas arke.

Liu Kezhuang (1187 – 1269)

La pejzaĝo en frua vintro

Mi vidas, vekiĝinte, tra fenestro matenruĝon,
La frosta vento trans bambuoj blovas fortiĝante.
Servisto, mi ordonis, novan varmĉambron aranĝas;
Malnovajn vintrovestojn knabo gladas laŭkomande.
La vino estas jam fermentigita, kaj viando
De kraboj grasaj flavas kiel tranĉita oranĝo.
Ĝardenaj krizantemoj kaj hibiskoj admirindas:
Ne preterlasi de nun ĝuon de l' naturoŝanĝo.

Lin Bu (967 – 1028)

La umefloro

Ĉiuj floroj falis, krom vi— vive prosperanta,
Nur al kiu ŝuldas sin la ĉarmo de l' ĝardeno.
Sur kristala akvo desegniĝas kelkaj branĉoj;
Subtila aromo ŝvebas dum krepuska sveno.
Antaŭ ol descendi, birdoj kaŝe vin rigardas;
Papilioj, se vin konus, sentus sin humile.
Sed, feliĉe, por mi eblas skandi, sen muziko
Kaj sen vino, kor-akorde al vi kaj trankvile.



Chen Tuan (906 – 989)

Reveno al ermitejo

Dek jarojn mi vane klopodis en tiu ĉi mondo,
Foj-foje en sonĝo alpaŝis al mi ermit-monto.
Honora rangeco kontentas malpli ol dormado;
Riĉaj zorgas pli ol malriĉaj en la vivparado.
Deprimas aŭd' pri suvereno en militdanĝero;
Afliktas vid' pri ebriuloj de orgiprefero.
Kun libroj malnovaj al ĉi ermitejo mi iros, —
Printempan aeron, ĉu floroj, ĉu birdoj, elspiros.

elĉinigis



Minosun (Ĉinio)

Liu Yong (ĉ. 984-1053)



Ĉe l'avantaĝa loko

—laŭ melodio *Wanghaichao*

Ĉe l'avantaĝa loko, sudoriente, kiel
ĉefurbo de Wu-Regno, de antikveco Qiantang*
fekundas en produktoj, prosperas en pomp-bril'.
Salikoj en nebulo, arkpontoj buntfarbitaj,
kurtenoj, murtapiŝoj helverdaj de beril',
tavoloj kaj tavoloj da domoj laŭ deklivoj.
Ĉirkaŭe vivas tie jen hejmoj mil kaj mil.
Arbegoj flankas sablajn digegojn de l'rivero,
ondtajdoj frapas bordojn neĝblanke en oscil',
senlime sin etendas vastaĵo de la akvoj.
Vendiĝas en bazaroj je onia admir'
juveloj la trezoraj, kaj hejme oni tenas
satenojn kaj silkaĵojn, konkure por parade
eksponi riĉon, lukson, vanteme kun aspir'.

Du lagoj** , verdaj montoj ĉikaŭaj bele ĉarmas,
aŭtunosmantoj floras kun aroma elspir',
somere okulplaĉas lotusoj sur vastejo.
En tag' serena oni gaje ludas flutojn,
dumnokte lotussemojn kolektas kun facil'
knabinoj kaj fiŝistoj kantante sur la lago.
Soldatoj mil eskortas la ĉefon revenantan
de la inspekt' ofica en ĉi-loka rondir'.
Aŭskultas mi la fluton kaj kordojn de muziko,

poemojn verkas, ĉantas mi kun vino-entir',
kaj spektas vidindaĵon de montoj kaj riveroj.
Mi volas ĝin vortigi jen per prilaŭda stil',
iutage ĝin prezentos al korteganoj pave,
ke tie mi vivis plezure kun trankvil'.

Qiangtang estas nuna Hangzhou oriente de Ĉinio.

*** Du lagoj: la fama Okcidenta lago en Hangzhou estas dividita en du lagojn, internan kaj eksteran.*

Super montosupro

—laŭ melodio *Kurba peniko el jado*

Super montosupro
ŝvebas nuboj ĉe vesper'.
Mi apogas min sur la balustrado
por rigardi al river'
kie regas nur nebulo trista.
La okulojn ja invadas ĉagren-gel'
de l' aŭtuna malvarmeto.
Ne toleras mi rigardi
tiun mondon jen en frid-sever'.
Malproksime en ĉefurbo imperia
loĝas mia amatin' kun bel'.
Ek de la disiĝo mi neniam
aŭdas pri ŝi, ho, l' anĝel'.
Mi, pro tio, kovas sopiremon
longan kun korprem-kruel'.
Ĉu sovaĝanser' alportas
la leteron de ŝi tra l' ĉiel'?
Ho, ne! ĝi jam flugas
sur sablejon laŭ ventopel'.

En la pasintec' mi kaj ŝi
havis multajn kunojn
kaj renkontojn en ĝoj-hel'.
Sed nun malfacile nia rekuniĝo,
ve, realigeblas laŭ esper'.
Male en mi ja naskiĝas
ĝenoj kaj ĉagrenoj en kor-sfer'
jam nesubigeblaj.
Nur la sopiremo longe daŭras
sen intervidiĝi kun liber'.
Surgrimpad' al montoj aŭ alveno
ĉe riveron ĉiam vekas en mi
la paseojn triste kun sufer',
kaj desapontiĝon en koro.
Mi nur tenas min silenta
tutan tagon en desper',
ne plu supreniri alten
por rigardi foren
kaj eviti naskon de mizer'.

Malvarmaj nuboj regas sur ĉielo

—laŭ melodio *Ĝojo en meznokto*

Frostaj nuboj regas sur ĉielo.
En vetero malserena
mi veturas per boato
bonhumore de la riverbordo.
Tra mil montoj, klifoj,
mi atingas lagon en smeraldo,
kie ondoj jam formortis
sed minacas vento per invado
el l' arbaro ekblovanta.
Plie aŭdas mi vendistojn
reciproke salutdiri kun beato.
Kun hisitaj alte veloj
ĵonkoj glitas jen en glato.

Sur la bordo flirtas
flagoj de vinovendejoj,
kaj vilaĝo nestas en nebulo,
sub fumnuba subpremado
kaj ekstere staras kelkaj arboj
ekvelkintaj jam post prujna bato.
Sub la subiranta sun' fiŝistoj
hejmeniras kunfrapante
tabuletojn en ĝojplena stato.
Lotusfloroj mortaj kuŝas
tie kaj ĉi tie en sporado,
sub la ombr' de poploj kalvaj.
Ĉe la bord' du-aŭ-triope
lavistinoj babilante en privato
iras jen honteme kun rideto,
evitante homojn sur la pado.

Tio vekas ĉe mi sopiremon,
kaj mi pentas, ke forlasis mi ŝin
en la buduaro por ter-vado,

kiel lemn' vaganta moviĝeme.
Kiam povus mi plenumi
rendevuon kun ŝi laŭ kor-ŝato?
Trista afliktiĝo en la brusto
kaj nepov' reiri al ŝi je jarfino
tiras larmojn miajn je miriado.
Mi rigardas vojon la revenan vane
en grakado de sovaĝanseroj eĥe,
kaj mi estas senkonsola, do.

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Mimoza Ahmeti (Albanio)



Decembra sonĝo

Kun benkoj la strato kaj la parko
La steloj haltintaj sur la arboj.
La luno fiksita en la ĉielo
Kvazaŭ en la gravuraĵo.

— Kial tiom longedaŭra ĉi tiu silento?
— Ni rompu ĝin- diras ci.
Kaj mian manon prenas en la ciaj
Tutvarme.

— Ĉu la apokalipso ekokazus,
se mi unufoje cin kisus?
— Ne kredas- mi murmuras
kaj la paroloj en la vento ektremas.

Sin detenis mirigita la strato!
La steloj sur la arboj scivolemas...
Ĉu estas sonĝo ĉi tiu vespero?!
Ĉu ĝi gravuro estas?!

Longe vin ne vidinte

Longe vin ne vidinte
Longe mi ne vidite,
Ĉi vespere mi timon sentas,
Necertecon en ĉi tiu ĉambro
Kvazaŭ ci ie ĉi tie estas
Ĉi tie en la nedifinita direkto
Ĉi tie en la ĉiu direkto.

Viva pulvoro ci estas,
falanta de miaj ŝultroj
Elverŝante de la lipoj,
hararo, okulharoj,
Tiom multe mi amis vin,
Tiom multe vi amis min,
Kiom ne sufiĉas ja la
monatoj kaj la vivodaŭroj.
Ni do malamu tiun,
Kiun ni amis ĝis nun.

elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKNAŬA

Plena kompreno pri la vivo

§19-01

Tiu, kiu havas plenan komprenon pri la esenco de la vivo, ne serĉas tion, kion lia vivo ne povas atingi; tiu, kiu havas plenan komprenon pri la esenco de la Destino, ne serĉas tion, kion lia inteligenteco ne povas atingi. Por nutri la fizikan formon necesas sin provizi per materialoj; tamen ekzistas iuj, kies fizika formo ne estas bone nutrata, kvankam abundo da materialoj estas en ilia posedo. Por la konservado de la vivo plej gravas malebligi, ke la vivo apartiĝu de la fizika formo; tamen ekzistas iuj, kies vivo jam ne ekzistas, kvankam ilia fizika formo ankoraŭ ekzistas. La veno

de la vivo ne povas esti rifuzita, kaj la foriro de la vivo ne povas esti malhelpata. Ho ve!

Oni kredas, ke la vivo povas esti konservata per nutrado de la fizika formo, sed se la nutrado de la fizika formo ne estas sufiĉa por la konservo de la vivo, kio alia do tiam estas farinda en tiu ĉi mondo? La nutrado de la fizika formo ja ne meritas esti farata, kaj tamen oni ne povas ne tion fari, ĉar tio estas neevitebla.

Tiu, kiu volas liberigi sin de la ŝarĝo nutri sian fizikan formon, prefere forlasas la mondajn aferojn. Forlasinte la mondajn aferojn li povas esti libera de tiuj aferoj; estante libera de mondaj aferoj li povas teni sian koron pura kaj kvieta; tenante sian koron pura kaj kvieta li povas akordiĝi kun la naturo; akordiĝante kun la naturo li povas proksimiĝi al la Taŭo. Kial la mondaj aferoj devas esti forlasitaj? Kial la vivo devas esti forgesita? Forlasinte la mondajn aferojn li ne plu penigas sian fizikan formon; forgesinte sian vivon, li ne plu malŝparas sian vitalan energion. Sana fizika formo kaj sufiĉa vitala energio ebligas al li konformiĝi kun la naturo. La ĉielo kaj la tero naskas ĉiujn estaĵojn en la mondo. La kombino de la jino kaj la jango donas formon al la estaĵoj; ilia apartiĝo estigas novan komencon. La perfekta stato de la fizika formo kaj la vitala energio siavice helpas al la naturo ŝanĝiĝi.

§19-02

La majstro Liezi demandis Guan Yin:

“La perfekta homo ne sufokiĝas tiam, kiam li naĝas en la akvo; li ne brulvundiĝas tiam, kiam li paŝas sur la fajro; li ne teruriĝas tiam, kiam li estas levita altege super ĉiujn estaĵojn. Ĉu mi povus demandi, kiel li povas atingi tion?”

“Li povas tion atingi,” respondis Guan Yin, “dank’ al tio, ke li tenas sian spiron en la plej pura stato, sed ne al sia inteligento, sia lerteco aŭ sia kuraĝo. Sidiĝu kaj mi diros al vi la detalojn. Ĉio, kio havas formon, bildon, sonon kaj koloron, estas estaĵoj. Kial do estas granda diferenco inter ili? Kiel do unu el la estaĵoj povas esti supera al alia dum ili ĉiuj egale estas estaĵoj kun formo kaj koloro? La estaĵoj estiĝas el la senforma Taŭo kaj fine revenos al la eterna Taŭo. Kiel do la mondaj aferoj povus fari limigojn al la perfekta homo, kiu ĝisfunde komprenas tiun ĉi veron? Li restas inter moderaj limoj, kaŝas sin en obskureco kaj vagadas en la regno de la Taŭo, kie ĉiuj estaĵoj havas sian komencon kaj finon. Li alkroĉiĝas al sia natura dispozicio, nutras sian vitalan energion kaj konformigas sian virton al la Taŭo de la ĉielo, por ke li povu komunikiĝi kun la naturo. Tiel agante, li tenas sian naturan dispozicion kaj sian vitalan energion en perfekte bona stato. Kiel do eksteraj estaĵoj povus eniĝi en lin kaj lin influi?

“Tiu, kiu ebria falas el ĉaro, kvankam kontuzita, ne perdas sian vivon. Li havas la samajn ostojn kaj artikojn, kiel aliaj homoj, sed li ne estas tiel grave vundita, kiel la aliaj, kiuj falas samtempe kun li, ĉar tiam lia menso estas en komplete neĝenata stato. Li estas senkonscia tiam, kiam li veturas, kaj senkonscia ankaŭ tiam, kiam falas el la ĉaro. Ĉar nenia ekpenso pri la morto aŭ vivo, nek surprizo penetras en lian menson, li tute ne estas terurita de la akcidento. Se la vino povas helpi al li konservi la vivon, kiel do multe pli la Taŭo de la naturo povas helpi al la homoj konservi la vivon! Sekve la saĝulo serĉas rifuĝon en la naturo, kaj tiele li estas vundata de neniu estaĵo en la mondo.

“Kiam la venĝema homo ne rompas la glavon, kiu lin iam vundis, kaj la malpardonema homo ne plendas pri la tegolo, kiu falis sur lin, tiam la mondo estos en paco kaj ordo. Tiam estos ne plu tumulto de milito, nek punoj de morto, ĉar ĉiu nur serĉas rifuĝon en la naturo.

“Anstataŭ disvolvi la vulgaran saĝecon, disvolvu la naturan dispozicion. Per disvolvo de la natura dispozicio leviĝos la virto; per disvolvo de la vulgara saĝeco leviĝos malbono. Ne kontentiĝu per la naturdotoj, nek neglektu la saĝecon de la homo, kaj la popolo pliproksimiĝos al la naturo.”

elcinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yanke (Ĉinio)

Rododendroj disfloras

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Sur monto
punktas plene
blank' kun ruĝa nuanco
kvazaŭ brilanta geme,
ha, kaj rubene.

Deklive
floroj en proper'
pavas tavolon super
tavolo jen en eter'
ŝajne en fabel'.

Rozetaj
petaloj kun sku'
svingiĝas en zefiro,
rave invitaj al ĝu'
por okuloj, nu.

Sur branĉoj
ankoraŭ sidas
burĝonoj verdaj hele,
kiuj ovriĝi avidas
kaj l' mondon vidas.

Matene
roseroj rule
gutas el la petaloj
sur grundon jen susure,
vere plezure.

Jadranka Miric (Serbio)



Kiam animo ploras

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Tremantaj
animoj niaj
sendormas mi pro dolor',
pro maljustecoj fiaj,
tut-malegalaj.

Malgrandas
serbio. Fortas
ĝi. Milionojn donis
por vivi pace. Preĝas
ni pli kaj kredas.

Suferas
animoj.Ho,ve.
premoj,oftaj minacoj,
tro da ĉantaĝoj por ke
ni vivu aĉe.

Eŭropo
silentis honte.
Subskribojn ili viŝis,
reprenis difektonte
pacon ! Estonte!

Mizera
kaj izola viv'
longe daŭras kaj kaŭzas
konfliktojn pro falsa viv'.
Vivo en ne viv'.

Kanajlo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Videblas
brila okulpar'.
sub somera ĉapelet'.
Vesperiĝas en arbar'.
Domo en najbar'.

Okulo
al okulo. Ho.
vizaĝo al vizaĝo.
Vangofrapoj kaj ŝoko!
Sangis brovarko.

Lumigis
kandel' la domon .
Miskompreno sed bato ?
Fidu propran okulon.
Streĉas koron.

Makuloj
sufiĉe klare
akuzas. Ŝin li batis.
Tio evidentis are .
Vangfrapo pare .

Riproĉe
krias rigardoj. ..
Ĵaluzo kaj fi-klaĉoj.
Tiom da vangofrapoj.
Fi-onidiroj.

Luiza CAROL (Israelo)

Sopiro en Junio

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Feliĉo
signifas amon,
komfortan etan neston,
la familian varmon
kaj plenan sanon.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

M. M. Zoŝĉenko*

Feliĉo

Iufoje mi volas aliri al ne konata homo kaj demandi: nu, kiel vi fartas, frato? Ĉu vi estas kontenta pri la vivo? Ĉu estis en via vivo feliĉo? Nu, rigardu ĉion travivitan.

De tiu tempo, kiam oni diagnozis ĉe mi gastriton, mi demandas pri tio multajn homojn.

Iuj respondas per ŝerco – mi vivas, juvelojn trivas. La aliaj komencas mensogi – mi vivas pompe, plibonon mi ne bezonas, perlaboras laŭ la sesa grado, estas kontenta pri la familio.

Sed nur unu homo respondis al mi je tiu demando serioze kaj detale. Respondis al mi mia bona amiko Ivan Fomiĉ Testov. Lia profesio estas vitristo. La homo estas simpla kaj kun barbo.

– Ĉu feliĉo? – li demandis min. – Jes, certe feliĉo estis.

– Nu, – mi demandis, – ĉu granda feliĉo estis?

– Ĉu granda aŭ malgranda, estas nekonate, sed ĝin mi memorfiksis por la tuta vivo.

Ivan Fomiĉ fumis du cigaredojn, kolektis la pensojn, ial palpebrumis al mi kaj komencis rakonti.

Tio estis, mia kora amiko, antaŭ dudek aŭ dudek kvin jaroj. Mi estis tiam bela kaj juna, havis dandajn lipharojn kaj plaĉis al mi. Kaj mi konstante atendis, kiam al mi feliĉo venos. Sed jaroj pasis laŭ sia vojo, kaj nenio okazis. Jen mi edziĝis, jen mi pugnobatalis en la geedziĝa festo kun parencoj de la edzino, jen post tio la edzino naskis infanon. Jen la edzino mortis. Jen ankaŭ la infano mortis. Ĉio iris glate kaj kviete. Kaj ne estis en tio ia feliĉo.

Sed foje la 26-an de novembro mi eliris al la laboro, kaj post la laboro vespere eniris en restoracion por trinki teon.

Mi sidis kaj trinkis el subtaso. Kaj mi pensis: jen jaroj iras laŭ sia vojo, sed feliĉo estas nevidebla.

Ĵus mi tiel pensis – mi aŭdis diversajn kriojn. Mi returniĝis – mastro svingis la manon, kaj knabo-helpanto svingis la manon, kaj antaŭ ili cara soldato staris kaj provis sidiĝi ĉe tablo. Sed la mastro forpuŝis lin de la tablo kaj ne permesis sidiĝi.

– Ne, – li kriis. – Soldatoj ne havas permeson en restoracioj sidi ĉe tabloj. Mi pro tio povas pagi monpunon. Foriru, kara.

Sed la soldato estis ebria kaj tamen provis sidiĝi. Sed la mastro forpuŝis lin. La soldato sakris.

– Mi, – li kriis, – estas tia kiel vi! Mi deziras sidiĝi ĉe la tablo.

Nu, klientoj helpis – elpuŝis la soldaton. Sed la soldato prenis ŝtonon de pavimo kaj ĵetis ĝin al spegula vitro. Kaj forkuris.

Sed la spegula vitro havas dimension de 4 je 3 metroj kaj havas grandegan koston.

La gamboj de la mastro fleksiĝis. Li ekkaŭris, svingis la kapon kaj timis rigardi al la vitro.

– Kio okazas, civitanoj? – li kriis. – La soldato bankrotigis min. Hodiaŭ estas sabato, morgaŭ estos dimanĉo, dum du tagoj ne estos vitro. Tuj mi ne povas trovi vitriston, sed sen vitro vizitantoj ofendiĝas.

Kaj vizitantoj efektive ofendiĝas:

– Blovas, – ili diras, – el la truita aperturo. Ni venis por sidi en varmo, sed ĉi-tie estas tia truo.

Subite mi metis subtason sur la tablon, kovris per ĉapo la tekruĉon, por ke ĝi ne malvarmiĝu, kaj trankvile aliris la mastron.

– Mi estas vitristo, kara komercisto.

Nu, li ekĝojis, kalkulis en la kaso monon kaj demandis:

– Kiom kostas tiu laboro? Ĉu vi povas el pecoj kunmeti?

– Ne, kara komercisto, el pecoj nenio rezultos. Estas necesa vitro de 3 je 4 metroj. La kosto de tiu vitro estas 75 rubloj, kaj la pecojn mi prenos por mi. Tiu kosto, kara komercisto, estas sen konkurenco kaj sen priparolado.

– Ĉu vi freneziĝis? – la mastro diris. Sidiĝu ĉe via tablo kaj trinku teon. Anstataŭ pagi tian summon, mi prefere per litkuseno ŝtopos la aperturon.

Kaj li ordonis al la mastrino tuj kuri al la loĝejo kaj alporti litkusenon.

Kaj jen oni alportis litkusenon kaj ŝtopis. Sed la litkuseno falis jen eksteren, jen internen, kaj tio kaŭzis ridon. Kaj iuj vizitantoj eĉ ofendiĝis – estas mallume kaj malbele trinki teon.

Unu vizitanto (mi estas dankema al li) leviĝis kaj diris:

– Mi povas rigardi litkusenon hejme, por kio mi bezonas vian litkusenon?

Nu, la mastro ree aliris min, petegis momente kuri por vitro kaj donis monon.

Mi ne fintrinkis la teon, premis la monon en la mano kaj kuris.

Mi alkuris al vitrovendejo – la vendejo estis fermata. Mi petegis – oni enlasis.

Ĉio estis, kiel mi pensis, kaj eĉ pli bone. Vitro de 3 je 4 metroj kostis 35 rublojn, pro transportado oni prenis 5 rublojn, sume 40 rublojn.

Kaj jen mi enmetis la vitron.

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Mi fintrinkis la teon kun sukero, mendis fiŝan supon, poste ratatujon. Mi manĝis ĉion kaj ŝanceliĝante eliris el la restoracio. En la mano estis 30 rubloj. Mi povis fordrinki ilin, povis elspezi laŭ mia ajna deziro.

Kiel mi drinkis tiam! Dum du monatoj drinkis. Krom tio mi aĉetis arĝentan ringon kaj varmajn surplandaĵojn. Mi ankaŭ volis aĉeti pompan pantalonon, sed mono mankis.

– Jen, mia kara amiko, kiel vi vidas, en mia vivo estis felietĉo. Sed nur unufoje. La tuta cetera vivo fluis glate, kaj granda feliĉo ne estis.

Ivan Fomiĉ eksilentis kaj ree ial palpebrumis al mi.

Mi kun envio ekrigardis al mia kara amiko. En mia vivo tia feliĉo ne estis.

Sed verŝajne mi ne rimarkis.

* *Miĥail Miĥajloviĉ Zoŝĉenko (1894 – 1958) estis fama sovetia verkisto-satiristo. Tiun rakonton li verkis en 1924.*

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_